
# esperanto aktuala

Revuo de la **E**sperantista **B**rusela **G**rupo    Numero 5 / 2014








Maëna Volant




Pluraj bruselanoj renkontis ŝin per Esperanto en Belgio dum «Festo en Amikejo», pasintjare.
Ĉiuj memoras tiun helpeman, ridetantan kaj agrablan knabinon....
Tristege ni sciigas al vi ke Maëna forpasis tiun someron, la 24an de Julio en Malio en la aviadila kraŝo de la flugo AH5017 de Air Algérie.
Maëna Volant estis apenaŭ 20-jaraĝa. Ŝi estis aktiva ĉe JEFO (Junulara Esperantista Franca Organizo), kiel komitatanino.
En 2011-2012, ŝi intruis en Burkino (kiel voluntulino) dum dek monatoj. Ŝi reiris tien lastan Julion por revidi siajn lokajn geamikojn. Revenvoje, ŝi pereis kun 115 aliaj samsortanoj ...

Ni deziras esprimi sinceran kondolencon al ŝia familio kaj al ĉiuj ŝiaj multnombraj amikoj.



# K O L O F O N O

39a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/
**Prezidanto** : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
**Sekretario** : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj :** Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
**Eventoj :** JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG : www.esperantobruselo.org**
**Abona membriĝo** : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
**Kunvenejo** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



# A G E N D O

*Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo :* *www.esperantobruselo.org*

**Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede** en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono, Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.
Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

**EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,**
**bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981**

## SEPTEMBRO

| | | |
|---|---|---|
| **Dimanĉo la 14a** | **11:00 - 17:00** | **Vizito de la historia koro de Lieĝo**<br>Catherine Royaux (010/451921) |
| **Merkredo la 17a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego: Valère Doumont : « Kion proponi ene de Esperanto-movado al adoleskantoj »** |

## OKTOBRO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 1a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego: Stano Marĉek : « Ĉu vi ŝatas fungojn ? »** |
| **Vendredo la 3a** | **20:30 - 22:30** | **Koncerto : Platano**<br>Rock-City Café, Strasburgo - FRANCIO |
| **Dimanĉo la 12a** | **10:00 - 17:30** | **Verda promenado en Bruselo**<br>mlaitat@yahoo.fr aŭ 0486 96 92 14 |
| **Merkredo la 15a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego: Bert Boon : « La Gotha letero »** |
| **Merkredo la 29a** | **18:30 - 20:00** | **ĜENERALA ASEMBLEO de EBG**<br>**Efektivaj membroj** estas insiste - **kaj estraranoj tre insiste - petataj ĉeesti.** |

## NOVEMBRO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 12a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego: Bernard-Régis Larue : «Kosmoŝipo Rosetta»** |
| **Merkredo la 26a** | **18:30 - 20:00** | **Prelego: Eric Baert : «Laboro en Irako»** |

## Saluton Kara Legantaro !



Esperanto estas.... amuza !
Jes, esperantuloj ludas, blagas, plezure renkontiĝas, vojaĝas, ĝoje interesiĝas pri kulturo kaj pri multaj aliaj aferoj, ktp...
Sed kelkfoje Esperantio ne eskapas la malbonan sorton de la vivo.
Dum la ferioj, ni eksciis la forpason de Maëna Volant (paĝo 2). Tiu tristega novaĵo afekciis nin tre forte. Eĉ se ni ne bone konis ŝin, Maëna jam mankas al ni, ŝia rideto, ŝia bonhumoro, ŝia sindonemon ankaŭ ...


Ŝi ŝatas amikecon, fratecon, solidarecon, ... sed ankaŭ ĝojon !
Tiel ni pluigos, Maëna. Ni ne forgesos vin !

*Viaj redaktoroj*
aktuala@esperantobruselo.org

## Enhavo


| | |
|---|---|
| Paĝo 2 : | Maëna |
| Paĝo 3 : | Kolofono kaj Agendo |
| Paĝo 4 : | Edito kaj Enhavo |
| Paĝo 5 : | Voĉoj de la Tempo + Vizito de historia koro de Lieĝo |
| Paĝo 6 - 7 : | Verdaj Skoltoj |
| Paĝo 8 : | Amikinoj en Halle + Kongreso en Polleur |
| Paĝo 9 : | Reklamo por Platano kaj diversaj aferoj |
| Paĝo 10 - 11 : | Ciril kaj Roz, Vojaĝo per biciklo |
| Paĝo 12 - 14 : | Liba en Nepalo |
| Paĝo 15 : | Robot-restoracio en Kuŝan + Wildleaks |
| Paĝo 16 : | EEU-Projekto lingvo.info petas vian helpon |
| Paĝo 17 : | **Tagordo de la Ĝenerala Asembleo** |
| Paĝo 18 - 19 : | Someraj Eventoj |
| Paĝo 20 : | Sezonfina vespermanĝo Junio 2014 |

# Eduardo Galeano  «Voĉoj de la Tempo»




**Kontraŭflue**

La ideoj de la semajngazeto *Marcha* tendencis al malprofito, sed la financoj de la gazeto siavice estis plene en ĝi. Hugo Alfaro, kiu, krom esti ĵurnalisto, funkciis kiel afergvidanto kaj havis la malsanigan taskon pagi la fakturojn, saltis pro ĝojo nur je kelkaj tre maloftaj okazoj :

*- Jen, ni havas ion por pagi la venontan numeron !*

La reklamspaco estis vendita. Dum la tuta longa historio universala de la sendependa ĵurnalismo, oni festis tian miraklon kiel pruvon ke Dio ekzistas.

Male, Carlos Quijano, la direktoro, paliĝis. Kia hororo : ne ekzistis pli malbona novaĵo ol tiu bona novaĵo. Se ekzistis reklamo, tiam necesis oferi al ĝi paĝon aŭ eĉ plurajn paĝojn, kaj ĉiu peceto de paĝo estis spaco sankta kaj esenca por kontesti la certecojn, faligi la maskojn, skui la kverelojn kaj certiĝi ke morgaŭ ne estis simple nur alia nomo por hodiaŭ.

La militista diktatoreco, kiu ekfuriozis en Urugvajo, ĉesigis tridek kvar jarojn da ekzisto de *Marcha*, same kiel kelkajn aliajn gazetojn.







# Vizito de la historia koro de Lieĝo

## Dimanĉon la 14an de Septembro  2014

Ni invitas vin viziti « la historian koron de LIEĜO »

**Gvidado de lokaj esperantistoj**

## Rendevuo je la 11a :
## en la enirejo de la Palaco de la Princepiskopoj

Elstara vizito en tiu Tago de la Heredaĵo !
Lunĉpaŭzo en agrabla restoracio

Aliĝo dezirata

Pli da informoj ?



Catherine Royaux  (010/451921)
cat.royaux@netcourrier.com

# Somera tendumado de la Verdai





**Somera, somera… rapide dirite ĉar tiujare ni ne vere estis bonŝancaj : pluvo, pluvo kaj pluvo ! La belega belga vetero…**

Feliĉe por ni, ni havis kelkajn kontraŭpluvajn protektojn. Komence la ruldomon, kie ni kunsidis, ludis, babilis, telerlavadis, sekigis vestaĵojn, kuiris… kaj estis gajaj !



La terpo protektis nian memfaritan manĝejon : tablon kaj seĝojn faritajn el ligno kaj ŝnuroj.



Kaj fine la tendojn, ĉe la herbejo, kiujn ni kiel kutime starigis komence de la semajno.




Verŝajne kiel ribeliĝo kontraŭ la maljusta naturo, ni iel decidis tamen fari nian planitan dutagan marŝadon, malgraŭ la aĉa vetero. Programo : marŝi trovante vojon per mapo kaj serĉi dormejon, sen esti helpata de skoltestro. Estis certe okazo admiri la belajn valonajn pejzaĝojn !



Krom la verdaj skoltoj, ni ricevis specialajn gastojn kiuj venis de foraj landoj : Romain, Samuel kaj Marion el Svisio, kaj Martí el Katalunio.

Por valori niajn klopodegojn, ni iris al Aventur-parko apud Dinant. Ni grimpis surroken, transpasis pontojn kaj glitis laŭ aerokablo.





La lastaj okazaĵoj de la semajno estis eta vizito de Dinant, la fama urbo kun saksofonojn ĉie …



… Kaj la totemiĝo de Mélanie. Post diskutado ni decidis ke la besto kiu plej kongruas al ŝia personeco kaj vivmaniero estas **Linko**.





*Mélanie ne plu ekzistas. Salutu Linkon !*

**La malbona vetero ne faciligis nian semajnon. Pro tiu pluvo, nia nova amiko Martí bedaŭrinde ne ricevis bonan bildon de Belgio. Tamen la tendumado okazis senprobleme, dank'al la bonhumoro de la partoprenantoj, al etosiga loko kaj al pliboniĝanta organizado. Mi specife dankas nian helpkuiristinon Marion kaj nian estron Lupo por tiuj memorindaj momentoj !**

Didelfo (Samy)

→








Francine, Cécile, Renée, Liliane kaj Dina en Halle 02-07-2014

Renée Ost (maldekstre)

Dum jaroj, Renée Ost el la urbo Halle vizitadis Bruselon kiel membro de la Esperantista Brusela Grupo kaj de la Belga Esperantista Ferfojista Asocio. Bedaŭrinde ŝia sano ne plu permesas tion. Ŝi forte propagandis, ankoraŭ propagandas por Esperanto. Ŝi ankaŭ gvidis kursojn en Halle. Cécile Deprez kaj Liliane Ketelers el Ostendo, Dina Deloyer kaj Francine Sperber el la brusela grupo vizitis ŝin merkredon la duan de julio 2014. Belega vetero kaj bona manĝo.

Francine SPERBER

Saluton al ĉiuj!
La asocio sen profita celo "*Congrès de Polleur*" [Kongreso en Polleur] invitas vin al (franclingva) kolokvo pro la 225a datreveno de la "**Deklaracio pri la Rajtoj de la Homo kaj le la Civitano**" de Franchimont [Franka monto].
La malpli junaj inter vi verŝajne memoras pri trilanda renkontiĝo okazinta tiurilate en Franchimont (proksime de Vervierso)... antaù 25 jaroj, dum kiu ni inaŭguris la "**Vojon de la homaj rajtoj**" kiu trairas la urbojn iam apartenintajn al tiu lando (kaj eble vi tiam vizitis la belan kastelon de Franchimont...).
Pliajn informojn (ankaŭ en esperanto) ĉe José JACOB (087/22.10.79 sen retadreso nek retaliro).

Jean-Marie JACQUES, Komitatano de Senlime kaj EGV





# Rep-koncerto

## en Esperanto

## kun PLATANO

## Vendredo la 3a de Oktobro

Rock-City Café

24, rue des Poules

STRASBOURG

FRANCIO






34 Le pays de Dieulefit — Jeudi 4 septembre 2014 LA TRIBUNE

**PONT-DE-BARRET** Espéranto, le langage international

# Festo, la fête des jeunes espérantistes

C'est une tradition depuis 1996, les jeunes espérantistes organisent Festo, une rencontre internationale pour faire la fête. Cette année, cette rencontre avait lieu dans notre village au camp des Scouts et Guides de France du 16 au 23 août, réunissant une centaine de personnes de 16 nationalités. L'Espéranto a été inventé en 1887 par le docteur russe Zamenhof. L'Espéranto se veut être une langue internationale dont l'apprentissage est beaucoup plus rapide que les langues vivantes actuelles, des millions de personnes parlent l'Espéranto dont les racines sont empruntées aux langues latines et russes. La structure de cette langue a permis, notamment, de traiter efficacement des cas de dyslexie. En France, quelques universitaires l'enseignent mais en Hongrie, une option Espéranto fait partie de l'équivalent de notre baccalauréat.

L'Espéranto était le lien lors de Festo. Durant ce séjour dans notre village, un festival musical donnait la scène à des artistes espérantistes européens et à des groupes locaux, les habitants de la région étaient chaleureusement invités à participer à cette fête. Céline Bernard et Jérémie Bert, les responsables de l'organisation, avaient organisé diverses activités : des conférences sur la communication internationale, des séminaires dans le cadre du projet de la commission européenne Grundtvig, programme d'éducation pour les adultes reprenant leurs études, des activités sportives, ludiques, culturelles et touristiques pour découvrir notre région, bien sûr, tout en Espéranto. Notons que le 100e congrès mondial se tiendra à Lille du 25 juillet au 1er août 2015, ville proche de Boulogne-sur-Mer qui avait été le lieu du premier congrès en 1905. Le label vinilkosmo produit les CD et MP3 des chanteurs espérantistes.

Infos www.vinilkosmo.com et www.vinilkosmo-mp3.com


Des conférences multinationalités, un seul langage : l'Espéranto

www.horizonto.net

# Vojaĝo per bicikllo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'






## Grekio

(9/5 -> 20/5/2009 - 622 km => 4611 km)

▷Finite la monkonvertoj! Ni revenas en la eŭrozonon. Aliflanke, la alfabeto estas alia afero. Kelkajn kilometrojn post la landlimo ni plezure retrovas Lili kaj Eric, du perbiciklaj vojaghantoj jam renkontitajn en Mantovo, en Italio. Ni opiniis ilin antaŭ ni kaj ja ili reatingas nin. Ni interrakontas pri niaj respondaj aventuroj. Ili trafis la saman zorgon kiel ni, kiam ili eniris en Albanion. Iom post la landlimo kvar infanoj je dek kelkaj jaroj provis haltigi ilin por postuli monon kaj provis ŝteli tion, kion ili havis sur siaj sakoj.




Jam antaŭ eniri Grekion okulfrapas la impresa kvanto da tre etaj kapeloj vojflankaj. Ĉiuj pli belas ol la aliaj kaj enhavas piajn bildojn kaj longdaŭrajn kandeletojn. Oni starigis ilin por honorigi la memoron de homo mortinta dum trafikakcidento. Kiam pluraj tiaj kapeletoj videblas en sama loko estas saĝe mefii, la loko ja danĝeras.



Kelkajn tagojn poste, Lili kaj Eric denove retrovas nin dum ni trankvile sidas ĉe iu "kantina" por eviti la plej varman horon de la tago. Temas pri restoraciaj kamionoj vojflanke haltigitaj kaj de kie eblas akiri sandviĉojn aŭ kompletajn pladojn kontraŭ favora prezo. Seĝoj kaj tabloj en ombro ĝenerale uzeblas ĉeflanke. Ekde tagmezo ni kutimas serĉi tiujn kantinojn, kiel oazojn.




Ĝis nun ni neniam dormis en hotelo, escepte en Kroatio, kie esperantistoj invitis nin por dormi en pensiono. Ni preferas aŭ dormi en nia tendo en la naturo, aŭ gasti por kunvivi kun lokaj homoj. La malavantaĝo de plurtaga dormo ekstera estas la manko de elektro por replenigi la baterioјn. Ni do ne devas maltrafi ĉiun okazon uzi elektran konektingon.





Hodiaŭ, 10 km antaŭ la urbo Komotini, ni haltas apud granda industria entrepreno. Antaŭ ĝi staras "privata" kapelo.
Tio estas kutima ĉi-lande, homoj posedas personan kapelon en sia ĝardeno aŭ entrepreno.
Tamen malpli oftas kiam kapelflanke troveblas fontano, tablo kun pluraj benkoj, kradrostilo el cemento, necesejo kaj, priluksa kulmino por perbiciklaj vojaĝantoj, elektra konektingo, eĉ funkcianta!

Jen okazo por ke ni replenigu la telefonon, kuiru pastaĵojn je karbonara saŭco, purigu niajn vestaĵojn kiujn ni poste sekigos sur fadeno entenanta plurajn reklamflagetojn. Ni eĉ duŝiĝas surloke... dank' al duŝsprucigilo konektita al la krano per trancita aertubo.
Ni opinias, ke ni trovis maksimuman komforton, akvon, elektron, necesejon...



sed ni baldaŭ havos eĉ pli! Motorciklisto haltas por trinki el la fontano.
Li invitas nin al sia hejmo en Komotini por trinki kafon.
Tri horojn poste ni aliras lian hejmon. Li estas kuracisto kaj lia kunulino estas instruisto. Ili vespere invitas nin al picejo kaj disponigas al ni sofon por tranokti.
Niaflanke, ni malkovrigas Esperanton al ili. Ili ne konis ĝin kaj tio ŝajne tre interesas ilin.
La morgaŭon, dum ni surstrate estas ŝanĝantaj niajn pedalojn per pli bonkvalita modelo ol tiu trovita en Montenegro, spontane intervjuas nin ĵurnalistino de loka radio, kiu hazarde tie pasis.



Ni forlasas Grekion post irado laŭ la maro kaj trapaso de pluraj banlokaj urbetoj tre agrablaj kaj interligitaj de la vojo Egnatia. Ĝi estis origine konstruita de la romianoj, kiuj tre ŝatis la regionon pro ĝiaj varmakvaj fontoj. Ja ne frenezis la romianoj!

*(daŭrigota)*



# Speciala renkontiĝo en Nepalo



Nepalaj esperantistoj organizis tre sukcesan “Specialan Renkontiĝon” de la 6-a ĝis la 17-a de marto 2014.

Partoprenis ĝin ne nur nepalanoj, sed ankaŭ 17 gastoj el Ĉinio kaj eŭropanoj el Belgio, Bulgario, Danio, Francio, Pollando kaj Svislando.

La aventuro komenciĝis en la ĉefurbo Katmanduo. La akcepto estis varma, laŭ nepala kutimo oni tuj post la alveno ornamis nin per florkolĉenoj. Post la enhoteliĝo en la komerca kvartalo Thamel en hotelo Marshyangdi ni iom promenis akompane de nepalaj esperantistoj tra urbaj stratoj plenaj je turistoj.

La sekvan tagon ni vizitis lokajn vidindaĵojn: hindan templon Pashupatinath kaj budhan stupaon Boudhanath. En la proksima urbo Patan ni promenis kaj admiris artaĵojn faritajn el ligno. Elstaras tie la Kriŝna templo. Vespere okazis interkonatiĝo kun nepalaj samideanoj. La prezidantino de la Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) Indu Devi Thapaliya, Mukunda Raj Pathik kaj aliaj membroj post solenaj paroladoj malfermis la eventon. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj el la orienta parto de Nepalo familio Pokhrel, kies ĉarma 13-jara filo bonege parolis Esperanton.

Sabate la 8-an de marto ni vojaĝis al la nacia parko Chitwan - Koro de ĝangalo. Unue ni pirogumis kaj poste ni vizitis elefantfarmon kaj rajdis elefantojn. Ni estis bonŝancaj vidi deproksime rinocerojn kaj aliajn bestojn. En la parko troviĝas simioj, cervoj, aproj, multaj specoj de birdoj, krokodiloj kaj laŭdire eĉ tigroj, kiujn ni feliĉe ne renkontis. Impresis grandegaj termitejoj.

Post la reveno okazis kelkaj prelegoj: pri la Esperanto-instruado laŭ la metodo BEK rakontis Peter Wraae el Danio. Arie Bouman el Belgio prezentis bildojn el Islando kaj parolis pri siaj spertoj dum la 98-a UK en Rejkjaviko. La sekvan vesperon ni spektis tre belan folkloran programon de popolaj indiĝenaj dancoj.

En la urbo Lumbini ni vizitis la naskiĝlokon de Budho. Ni admiris Maya Devi templon kaj ankaŭ aliajn vidindaĵojn. En Palpa ni tranoktis. En la urbo Pokhara renkontis nin loka esperantisto Himalal Parajuli kaj pretigis por ni la jenan programon: matene ni per malgranda boato navigis sur la Phewa lago ĝis insuleto, kie troviĝas hinda Barahi templo. Sinsekve ni vizitis Binhdabasini templon, Mahendra kavernon kaj Seti gorĝon. Post la tagmanĝo ni vizitis la Internacian Himalajan Muzeon kaj poste ni ekskursis al la pagodo de Paco. Fine de la tago ni ankoraŭ sukcesis vidi Davis akvofalon. Vespere ni povis ĝui hotelan dancprogramon.



Sekvan matenon ni ellitiĝis tre frue kaj veturis al la montara vilaĝeto Sarangkot spekti sunleviĝon kaj vidi la Annapurna montaron. Poste ni havis liberan tempon por promenado aŭ aĉetado. Posttagmeze okazis serio da prelegoj. Peter el Danio prelegis pri la dana filozofo "Martinus", Eduard Kusters el Belgio pri la "Belga kompromiso", Pierre Bouvier el Francio klarigis, kial Esperanto estas pli simpla kaj efika ol baza angla lingvo. Barbara Pochanke el Svislando prezentis sian Esperanto-karieron kaj ĉe la fino Roman Dobrzynski el Pollando montris ege interesan filmon pri Oomoto, kiun li mem reĝisoris kaj produktis. Post solenaj paroladoj la vespero finiĝis per komuna vespermanĝo.

Sabate la 15-an de marto ni forveturis al Katmanduo kaj vespere ni ĉiuj estis invititaj al solena geedziĝa festo. S-ro Parashar Rijl edzigis sian filon. Ni ĝuis belan festadon kun viva muziko kaj bongusta manĝo.



Dimanĉe en Nepalo okazis festo de koloroj - Holi. Dum ĝi homoj, sed ĉefe gejunuloj, kolorigas siajn kaj aliulajn vizaĝojn kaj vestaĵojn. Ankaŭ ni ne eskapis tiun eventon kaj estante farbitaj ni promenis inter homamaso.



Matene ni vizitis religian ensemblon Swayambhunath, kiu troviĝas sur arbokovrita monteto. Ĝi estas konata kiel templo de simioj, kaj vere ili kuris ĉie samkiel en Pashupatinath. Ĉi-foje la tagmanĝon pretigis volontuloj en la sidejo de NEspA.
Ni ĝoje babilis, kantis kaj dancis. Ankaŭ dum la adiaŭa vespero ni bone amuziĝis. Nepalanoj donacis al ĉiu tipan ĉapon topi, ŝalon kaj monujon.
Maja Gorova el Bulgario prezentis sian landon kaj ĝian kulturon. Ilse Jacques el Belgio dankis al ĉiuj pro la bela renkontiĝo, kiun ŝi povis preskaŭ tute partopreni malgraŭ sia paŝproblemo.



La Speciala Renkontiĝo 2014 sub la gvido de Bharat K. Ghimire estis tre sukcesa, ĉiuj estis ravitaj. Ni kore dankas al la organizantoj de tiu unika evento kaj gratulas ilin pro la iniciato organizi tiun-ĉi specan aranĝon. Mi esperas, ke la movado en Nepalo daŭre floros kaj plifortiĝos. Sukceson al vi!



Liba Gabalda




Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

# Roboto-restoracio en Kunŝan, Ĉinio



Estas la unua ĉinia restoracio kiu uzas robotojn en Kunŝan, en la provinco de Ĵiangsu. La roboto-restoracio havas 15 robotojn, 1,2 m alte. Ĉiu roboto kostas 6500 $. Tiuj robotoj estas uzataj kiel pordistoj, kuiristoj kal kelneroj. Ili kapablas labori senĉese dum 11 horoj ! Ankaŭ, ili kapablas uzi 40 lingvajn basajn esprimojn, kies bonvenigi klientojn, ktp...

En la robot-restoracio de Kunŝan, robotoj surtabligas, sed ne nur ! Kelkaj ankaŭ vigligas la lokon per kantoj kaj dancoj.

# Wildleaks



*WildLeaks* estas la unua platformo, sekurigita, anonima, dediĉita al denunco de krimoj kontraŭ la sovaĝa faŭno kaj arbaroj.

La misioj de *WildLeaks* estas ricevi kaj taksi anonimajn informojn pri krimoj kontraŭ la sovaĝa faŭno kaj arbaroj kaj transformi ilin en agadoj.

**Kiel vi povas helpi nin lukti kontraŭ la krimoj kontraŭ la sovaĝa faŭno kaj la arbaroj :**

- Ni invitas ĉiujn personojn, kiuj posedas informojn, provizi *WildLeaks* per informoj denuncantaj la krimojn kontraŭ la sovaĝa faŭno kaj la arbaroj.
- Helpu *WildLeaks* malkaŝi la krimojn kiel ŝtelĉasado, faŭna ŝakrado, kontraŭleĝa arbara ekspluatado kaj la homan bilancon, kiu pezas malantaŭ la krimoj kontraŭ la sovaĝa faŭno.
- Sendu al ni anonime informojn, dokumentojn kaj fotojn uzante la sekurigitan sistemon de nia platformo.
- Konservu vian identecon anonima, se necese.

# lingvo.info - Grandega prilingva portalo petas vian helpon




Baze de la iama portalo kreita de E-junularo «Lingva prismo», kiu malnoviĝis, E@Iproponis al EEU ellabori kaj prezenti al fondaĵoj de EU projekton pri nova simila portalo prilingva kiu estos informa en multaj lingvoj kaj interesa kaj ludiga.

EEU trovis krom E@I pliajn 7 partnerojn kaj efektive ellaboris kaj transdonis la projekton kiu estis sukcesa ĉe la konkurso de Eŭropa Komisiono kadre de la subprogramo KA2 Lingvoj de Programo por tutviva lernado en 2012 kaj la Komisiono aprobis nian projekton lingvo.info.

La projekto estas nun preskaŭ en la fina versio (ĝi devas laŭkontrakte finiĝi en novembro 2014) kaj ĝi estos grandega portalo en la reto en kiu eblos en pli ol 20 lingvoj ekscii amason da datumoj pri lingvoj ĝenerale, lingvistiko kaj pri ĉirkaŭ 30 lingvoj konkrete.
Enestos ankaŭ lingva ludo.
En la projekto kiun gvidas EEU kunlaboras pliaj 8 partneroj el 7 landoj.
Kiam ĝi estos finita ĝi estos unu el la plej modernaj portaloj informantaj pri lingvoj (Esperanto estas unu el la lingvoj en kiuj ĉiuj informoj estos riceveblaj kaj unu el tiuj kiuj estas priskribitaj), kaj ĝi certe levos la prestiĝon de EEU sed ankaŭ de Esperanto ĝenerale.

La ankoraŭ konstruata beta versio de la retejo jamestas videbla ĉe lingvo.info. La aprobita sumo de la kompleta projekto estas 530.000 eŭroj, kaj Eŭropa Komisiono pagos el tio 420.000.
La ceteron devas trovi la partneroj mem.
El tiu tuta sumo EEU estas taskigita por 100.000 eŭroj, kaj el tio ĝi mem devas kontribui per 25% aŭ 25.000 eŭroj.
Tiun sumon ni parte certigis (nun ni havas ĉirkaŭ 13.000 ricevitaj de donacoj de individuoj) sed plu mankas 12.000 eŭroj kiujn ni devas trovi ĝis la mezo de novembro.La portalo estonte estos je dispono per la servilo kiun plu prizorgos la firmao Studio Gaus, unu el la nunaj projektaj partneroj.

Ni invitas ĉiujn helpopretajn esperantistojn kiuj komprenas la gravecon de tiu ĉi projekto kontribui per iu ajn sumo al la konto de EEU en Belga banko:
ING: IBAN: BE31380009814855BIC: BBRUBEBB aŭ ĉe UEA konto: eece-p.

*Sandra Schweder*

# Ĝenerala Asembleo de EBG 2013 la 29an de Oktobro 2014

kiu okazos en nia klubejo : Van Maerlant-strato 2, en 1000 Bruselo

**Tagordo**

1. Bonvenigo, konstato de kvorumo ( 2/3 de la efektivaj membroj)
2. Aprobo de pasintjara protokolo (vidu la sekvantan paĝon).
3. Raporto pri la pasintjara agado kaj nuna stato de la Grupo:
    - financa, fare de la kasisto.
    - morala, fare de la prezidanto.
4. Aprobo de la kontoj kaj malŝarĝo de la nuna estraro.
5. Sinprezento de la eventualaj kandidatoj por la estrarana elekto.
    - Normale Françoise PELLEGRIN iĝos estraranino
6. Elekto de nova estraro.
    - Normale Françoise PELLEGRIN estraraniĝos
    - 
7. Planoj kaj proponoj por lernojaro jam komenciĝinta, kaj Zamenhof-festo 2014? 2015.
8. Krom la necesaj modifoj pri ŝanĝoj en la estraro, ĉu la statutoj de la asocio estas ankoraŭ ĝisdataj ? Ni petis analizon de iu fakulo. Ĉu ne publikigi niajn statutojn ankaŭ en la nederlanda ?
9. Pro la fakto, ke la aliro en la Komosiona konstruaĵo pli kaj pli malfaciliĝas kaj ke la nombro de Komisionuloj en nia asocio malkreskas draste. Ĉu ne estas ĝusta tempo pripensi novan solvon, antaŭ sperti elpelon pro manko da Komisionulo ? Laŭrenzo kaj poste, mi, trovis De Piano Fabriek je 300 m de la Antaŭplaco de Sankta Giliso. Duoble malpli kosta ol pasintjara ideo (UPJB, despli ke ĝi ne estis vere neŭtrala). Ĉu eblos trovi lokon tie por meti nian bibliotekon? Kiu do tie plu funkcius efike. En De PianoFabriek, estas granda nombro da ĉambroj elekteblaj, ĉu por eta grupoj, ĉu por iom pli granda por la prelegoj kun interet aliro, ĉu por pli grandaj eventoj tiaj kiaj Zam-Festoj. Plie ankaŭ disponeblas kuirejo. Kaj tie ni povus organizi aferojn kiam ajn ?
   Ĉu finance eblas ? Unuavide, larĝe kalkulite, mi taksas la koston por la du grupoj + unu/du Festoj je 600-700 €. Mi kredas ke jes ! La nura ebla tubero estas ke nuntempe ni petas subvencion al FWB kaj ke tiu centro dependas de la flandra komunumo. Ĉu tamen tio povus daŭre funkcii? Aŭ ni tiukaze eble devus peti la subvencion al la flandra komunumo?
10. **Ni nepre bezonas**
    - Respondeculo por la organizo de kunvenaj agadoj (prelegoj, ktp …).
    - Respondeculo por la aliaj eventoj (Eo-Kafejoj-Eskapadoj-Vizito de Muzeoj, ktp …)
    - Respondeculo por la biblioteko
11. UK-Lille - ne forgesu aliĝi frue (decembre) por profiti pli grandan rabaton
12. **Post-Kongreso en Bruselo la 4an kaj 5an de Aŭgusto 2015.**
13. Kunlabora kampanjo kun APE por vigligi nian movadon (afiŝoj, reklamado, kursoj, ktp)
14. Diversaĵoj

**Efektivaj membroj** (kiuj, konforme al la Statuto, konsistigas la ĝeneralan membrokunvenon), estas insiste - **kaj estraranoj tre insiste - petataj ĉeesti.** Se tamen vi tute ne povas partopreni la ĜA-on, ne forgesu **doni skriban prokuron al iu alia efektiva membro por vin reprezenti**. NB : Membro rajtas reprezenti **nur unu alian membron** (Art. 10 de la statuto).

Kompreneble, ĉiuj kotizpagintaj membroj estas bonvenaj kaj havas parolrajton, kvankam sen voĉdonrajto.

**JM Nicolas de BUYL, Prezidanto**

# Someraj esperantaj eventoj



## IJK - Fortalezo

Inter la mondpokalo kaj la UK en Argentinio okazis IJK, en la magia nordbrazila urbo Fortalezo. Muziko, Varmeco kaj belegaj ekskursoj estis en la programo de tiu junulara renkontiĝo. Pli ol 150 esperantistoj partoprenis, inkluzive multaj eŭropanoj.






## UK - Bonaero

La 99a universala kongreso ankaŭ estis en bela urbo, Bonaero. Okazis interalie prelegoj, koncertoj, ekskursoj kaj amika futbalmaĉo inter esperanta kaj armen-devena argentinia teamo.











## • Somera tendumado de la verdaj skoltoj - Rosée

*Vidu paĝo 7.*

---



## • SES - Nitra kaj Moskvo

**La Somera Esperanto-Studado duobliĝis ! En du lokoj eblis renkontiĝi kaj lerni esperanton : dum julio en Slovakio, dum aŭgusto en Rusio.**

---

## • REF - Lesjöfors

**Ĉirkaŭ 35 esperantistoj iris al la 36a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj. 9 familioj el 9 landoj kuniĝis en Svedio kaj esperantumis en familia etoso.**

---



## • IJS - Horány

**La 25a Internacia Junulara Semajno okazis en Insula urbo norde de Budapeŝto, Hungario. La mirinda loko kaj efika organizado de la teamo de HEJ (Hungara Esperanto-Junularo) faciligis la bonegan etoson. Kiel ĉiujare, estis diversaj vesperaj programeroj (ludoj, filmoj, prelegoj, karaokeo, balo, diskoteko…) kaj tagaj kiel ekskursoj, trejnado de la esperanta teamo por la futbalmaĉo kontraŭ loka teamo.**




---

## • FESTO - Pont-de-Barret

**La « terure organizita » -kvankam bonega- esperanta muzikfestivalo kunigis esperantajn muzikŝatantojn sude de Francio. Vinilkosmo kiel ĉiam proponis riĉan kaj diverstipan muzikprogramon.**

# 25-06-2014
# Al Angelos Tsirimokos
# La Esperantista Brusela Grupo
# dankas vin






**Sezonfina vespermanĝo en greka restoracio**

